


205

RAPORTO
DE LA
III IBERIA KONGRESO
ESPERANTISTA



III^A IBERIA KONGRESO ESPERANTISTA

1087

III^A IBERIA KONGRESO ESPERANTISTA

KORDOVO, 10 - 12a de Majo 1925

IMPRESOJ KAJ RAPORTOJ

ALDONO AL LA KONGRESLIBRO



KORDOVO, 1925

Presejo LA PURITANA

III^A IBERIA KONGRESO ESPERANTISTA

KORDOVO, 10-12a Majo 1925

IMPRESOJ KAJ RAPORTOJ

ANTAŬ LA KONGRESO

LABORO, ATENDO, ESPERO

Kelke da vortoj kiel antaŭparoleto. Skribi raporton pri kongreso kredeble por la plejmultaj homoj ne signifas agrablajo. Ankaŭ por mi ne. Ke mi tamen ĝin faras. estas motivate de la germandevena verso:

«Al la neceso obeante, ne al propra volo»

Neceso kaj ankaŭ devo—kaj ĉar min oni elektis kongresa sekretario, do al mi ne restas alia solvo, Mi ripetas: estus por mi multe pli granda oportunaĵo legi ie ajn raporton, travivi tiamaniere denove la belajn kongrestagojn, kaj—eble—kritiki la raporton. Sed bedaŭrinde la mia ja estos kritikata, kaj mi el subjekto fariĝos objekto. Sed mi ĉesu «antaŭparolante», alie mi devos aŭdi citaĵon el Hamleto:

«Pli da enhavo, malpli da artaĵo».

La organiza kongresa komitato en la lasta semajno antaŭ-kongresa ne povis enlitiĝi ĉiutage pli frue ol noktmeze pro la finlaboro farenda. Sed kiam alvenis sabato la 9^a de majo kun la unuaj kongresanoj, la komitato povis kun trankvilanimeco atendi la kongrestagojn. La antaŭlaboroj estis faritaj, la ekspozicio aranĝita, la kunsidoj preparitaj. La ĵurnaloj «Diario Liberal», «El Defensor de Córdoba», «La Voz», «Diario de Córdoba», ĉi-ĉiuj el Kordovo, «El Noticiero Sevillano» el Sevilo «El Sol» el Madrido k. a. per antaŭanoncaj artikoloj jam estis avizintaj la publikon.

S-ino Adeline Adan el Gento (Belgio) estis la unua kongresano, kiu alvenis. Sekvis s-oj Artur Domènech, nia famkonata esperanta poeto kataluna, s-o Fr. Fikrle, ĉeĥoslovako, s-oj Maynar el Zaragoza kaj Rocamora el Barcelona, niaj meritplenaj organizintoj de Udkeilo kaj Dudkeilo (1.^a kaj 2.^a diskutantaj kunvenoj de esp-istoj el iberiaj landoj), s-oj Bau-sells kaj Ribó el Barcelona, Anguiano el La Línea kaj—unu el la unuaj—esperanta pioniro en Ekstremaduro, s-o Luis Campos-Badajoz.

Tiuj, kiuj sabaton posttgm. jam troviĝis en Kordovo, vizitis sub sperta gvidado de s-o Azorín la Moskeon, dumvoje admiregante flor- kaj kolorabundajn domkortojn. Domaĝe la vetero ne estis tro favora, kaj dum ni staris alte sur la antikva minareto, nuna katedrala turo, malagrablaj ventblovoj kun suficĉa pluvo bonvenigis la fremdulojn. Vidinte la Kordovan majestan monumenton el maŭra epoko, kaj vizitinte ankaŭ la ponton kaj riverbordon, ni returnis nin al la urbinterno, kie dumtempe novaj kongresanoj alvenis. Mi poste akompanis amikon Domènech, kaj pasigis belan horon kun li.

La seviljaj gesam-anoj estis komunikintaj sian alvenon je la 10^a vespere. Amiko Serrano Olmo (J.) kaj mi atendis ilin en la stacidomo, kaj ĝoje ni povis saluti ilin kaj konduki al la diversaj gastejoj. Mi povis premi la manon al Karolo, kun kiu mi havas vere amikajn rilatojn, kaj konatiĝis kun aliaj, inter ili kun la feliĉaj gegajnintoj de la lasta ekzamena konkurso en Seviljo, la ĉarma Henjo kaj la simpatia Don Juan. Poste kun ges-oj Iznardo mi iris al «Círculo de la Amistad» nia kongresejo, kie estis kunvenintaj jam preskaŭ ĉiuj kongresanoj. Regis tie kora ridado kaj vigla babilado esperanta, kiun spicis la ĉiam bonhumora Maynar per siaj ŝercoj.

Post la 12^a oni disiris. La komenco promesis belan sekvon kaj sukcesplenan kongreson.

LA KONGRESO

1.^a TAGO, DIMANĈO, 10.^a DE MAJO

LA MALFERMA KUNSIDO

La ĉefaĵo de l' tago: la malferma kunsido, estis vere impresiga solenaĵo. Je la 11.^a antaŭtgm. iom post iom pleniĝis la riĉe ornamita kunvena salono de l' urbestrejo. Ĉiuj sidlokoj estis okupitaj, kaj eksidis ĉe la prezideja tablo s-oj la provinca guberniestro, la urbestro, la prezidanto de l' organiza komitato, du reprezentantoj de la Akademio por Sciencoj Beletristiko kaj Artoj kaj la delegito de U. E. A. Sur la benkoj por la urbkonsilistoj sidis la diversaj reprezentantoj de naciaj kaj eksterlandaj esperantaj organizaĵoj.

S-o Fr. Serrano Olmo ekparolas hispane donante koncizan skizon pri la ĝisnunaj naciaj kunvenoj esper-istaj, akcentante la neceson de nacia organizaĵo kaj fine aludante la gravegan jaman valoron de Esperanto, facile ekkoneblan el la riĉenhava ekspozicio. Li dankas al la estraro pro ĝia kunhelpo kaj al la direktantoj de l' kazino (Círculo de la Amistad) pro la grandanima disponigo de ĝia bela domo kiel kongresejo. En Esperanto li salutas kaj bonvenigas la kongresanojn.

S-ro F. Azorín, del. U. E. A. kaj kongreskomitatano legas la alvenintajn salutleterojn kaj telegramojn el Madrid, Barcelona, Varsovia, Budapest, Freital (Saksujo), Waldshut (Badeno), Valencia, Tanger, Gibraltaro, Ceuta, Bilbao, Cheste, Palma de Mallorca, Jaen, Puebla de los Infantes, Utrera, Santander, Orense, Córdoba (societo de gasistoj), Mellid (Coruña), Lisboa, Teruel, Freiburg (Alemania).

Ĉi-loke mi mencias, ke kelkaj telegramoj, inter ili tiu altvalora de Kataluna Esperantista Federacio, alvenis nur postgm, kaj povis esti legataj nur en la 1.^a laborkunsido.

Inter la 10 ricevitaj telegramoj 6 estis esperantlingvaj, Nia konata esperanta najtingalo, fino Palmira Castellvi-Barcelono ekz. telegramas:

«Francisco Serrano. Ricevu vi kaj ĉiuj gekongresanoj mian plej koran saluton kaj miajn plej sincerajn bondezirojn —vivu Esperanto —P. C.»

Inglada, (unu el la 3 oficialaj reprezentantoj en Parizo):

«Korsaluton kaj grandan sukceson al Kongreso.»

Delfi Dalmaŭ, prezidanto de K. E. F.:

«Vivu Esperanto kaj ĝia interna ideo por konprenado kaj rekono inter homoj kaj gentoj-Vin esperantiste sincere salutas.—D. D.»

Grupo Sunradio Chestre:

«Tutkore aliĝas kaj salutas kongreson dezirante estu sukcesega por triumfi nian kaŭzon.»

Grupo Bilbao kaj Fr. Gorgues-Barcelona same sendis longajn telegramojn en Esperanto.

El la hispanlingvaj mi tradukas ĉi tie tiun el Valencio:

«Kore salutas kongreson dezirante plenan sukceson per rezolucio definitive nian reorganizon ĉu Hispana Asocio ĉu Iberia Konfederacio donante al ĝi karakteron praktikan por senpera efektiveblo, statuton facile rekoneblan de l' registaro, por kunigi ĉiujn niajn elementojn kaj komenci aktivan propagandon per gazetaran kaj alirimedon ĉu oficiale ĉu private por atingi baldaŭnan triumfon meritatan de idealoj pri progreso, frateco universa, kiujn ni subtenas. Direktantaro de esp-ista grupo Valencio.»

Pardonu tiu, al kiu ŝajnas superflua la citado de telegramoj. Mi konigis kelkajn (kaj estus volonte publikiginta ĉiujn, ankaŭ kartojn kaj leterojn, se la spaco ne estus tro limigita) por montri niajn bonajn interrilatojn, por montri ke Esp. servas kiel telegrafa lingvo kiel sur ĉiuj aliaj kampoj kaj por montri fine, ke nia kongreso kvankam modesta havis la simpatian de ĉiuj gesamanoj de l' duoninsulo kaj eĉ ekesterlande. Sed-ree al temo!

S-ro José Cruz Conde, laboremega urbestro de Kordovo nun paroladis en sia forta konvinka maniero, salutante la kongrespartoprenantojn en nomo de la urbo, ĉiam gastama, ĉiam protekta, ĉiam akceptema kaj en sia propra. Ĝojigite li akceptis la dankojn pro sia kunkelpo ĉe la urbestrejo kaj kazinestra-ro por la esp-istoj kaj, kiel ne esperantisto, li malfermis larĝan


perspektivon skizante, ke interŝtata kaj diplomata lingvo, ĝis nun nacia, pro la ĉiama kulturevoluo devos fariĝi egale neŭtrala al ĉiuj, kia estas Esperanto.

Laŭta aplaŭdo dankis lin.

Vice nun parolsalutis la delegitoj, ĉu hispane, ĉu esperante, s-ino A. Adan el Gante (Belgio) precipe laŭdis Hispanujon pro ĝia homama helpo al sia lando milite kaj postmilite.

S-ro Fr. Fikrle, inspektoro de ĉeĥoslovakaj fervojoj en Bratislavo, nome de ĉeĥlingvaj esp-istoj.

S-ro P. Linarès, honora kongresprezidanto kaj honora membro de U. E. A., la «avo» de la Kordova esp-istaro parolas por la franclingvaj sam-anoj.



Prezida tablo de la malferma kunsido

S-ro J. Berger, kongressekretario, nome de german-lingvaj esp-istoj aŭstraj, ĉeĥoslovakaj kaj germanaj.

S-ro A. Domènech, kataluna poeto multofte premiita, por Kataluna Esp-ista Federacio.

Parolas s-ro advokato Maynar-Zaragoza en la nomo de la aragonaj sam-anoj.

S-o Manuel Iznardo-Sevilla, prezidanto de tiea grupo en

ĝia nomo, frate salutante la fratan urbon kaj la fratan grupon.

Nun prezentas la salutojn de la Madrida Grupo kaj de tuta Kastilio infantería komandanto Julio Mangada, nia konata reprezentanto oficiala en la kongresoj internaciaj de Praha, Helsinki kaj Wien, lastjare.

Sekvas lin, elokvente parolante, s-o R. Rocamora advokato kaj publikigisto el Barcelona, kiu transdonas la salutojn de Barcelona Esperantista Societo.

Post ĉiuj-ĉi pli-malpli longaj salutoj leviĝas la prezidanto de la Kordova Akademio por Sciencoj, Artoj kaj Literaturo, s-ro Manuel Enriquez Barrios, kaj per belforma parolado li salutas en nomo de la Akademio, kiu montris sian intereson por la kongreso, protektante la ekspozicion kaj proponas denove siajn servojn al la altideala afero. —Aplaŭdoj vivaj al li kaj al la Akademio.

S-ro Fr. Azorin parolas nome de U. E. A., iom aludas ties gravecon por la tutmonda esp-a movado, kaj salutas esperante la kongresanaron, post kiam li estis eldirinta en ĉies nomo la sinceran dankon al la aŭtoritatuloj.

Sinjoro la civilguberniestro fermas la kunsidon per belaj vortoj kaj promesas persone transdoni al la registaro la decidojn kaj rezoluciojn de l' kongreso, kiun li deklaras malfermita.

Oni disiris, ne sen esti fotografitaj. Jam la 1^a horo sonis. Do, la tagmanĝo atendis. Kaj ni ĉiuj, por fortigi nian korpon por la posttagmezo, serĉis niajn diversajn hejnurojn, hotelojn kaj manĝotablojn.

LA EKSPozICIO

Je la 3^a posttgm, proksimume kuniĝis la plimulto de la kongresanoj en la ejo de la ekspozicio, supra, vitrefermita, helluma koridoro en la kongresejo. Por ĝin atingi vi devis trairi belan kolonĉirkaŭitan korton. Tie, sur ĉemuraj longaj tabloj etendiĝis la trezoroj el literaturo, sciencoj, ĵurnalistiko, muziko kaj korespondado esperantlingvaj. Ĉiu estis surprizita, enpaŝante kaj ekvidante tian multon da bele binditaj libroj kaj broŝuroj kuŝantaj unu apud alia, tiom da gazetoj, revuoj

kaj ĵurnaloj, pendantaj en ses vicoj ĉe la muro El la ekstrema oriento prezentigis esperantaj folioj, el Japanujo, Ĥinuĵo, Filipina Insularo, el la mistera Hinduĵo, el Grekuĵo same kiel el la norda Finnlando, el Afriko, ambaŭ Amerikoj kaj Aŭstralio. Kaj gravuloj troviĝis inter ili: la ruĝaj famaj kajeroj de la Revuo antaŭmilita; la belilustrita nuntempa Literatura Mondo, Heroldo la duonsemajna, Esperanto de U. E. A. kaj multaj, multaj naciaj esperantaj gazetoj. Oni kalkulis ilin. Cent kvardek kvin. Kaj neniu ripetita!

La meza, iom elstaranta tablo, super kiu inter du belkoloraj afiŝoj pendis la bildo de nia nemortebla Zamenhof, estis precipe dediĉita al la verkaro de nia majstro. Ĉiuj liaj verkoj montriĝis tie, la Biblio, liaj klasikaj tradukoj, liaj prilingvaj laboroj. Kaj en apuda vico la libroj de niaj kongresoj, signoj, atestoj de la triumfa marŝo de Esperanto, sed ankaŭ montriloj por la laboro farita de la «diligenta kolegaro». Religiajn librojn oni vidis (preĝlibroj, Nova Testamento), tradukojn el famaj aŭtoroj (Virgilio, Molière, Shakespeare, k. c.), la longan serion de la malgrandaj volumetoj verdaj de Esperanta Biblioteko Internacia kun plej varia, riĉa enhavo, la eldonaĵojn de Hirt & Sohn, inter ili la ampleksajn romanojn de Luyken kaj Forge, la trivoluman «Faraonon» de Kabe rajte laŭdegatan, «For la Batalilojn» en la bonega traduko de Caumont kaj multajn, multajn aliajn. Kiu povus nomi ilin ĉiujn! Ilia nombro estis pli ol 200.

Ne malpli riĉa estis la fako «Gramatikoj, Vortaroj, Lernolibroj». Ekzempleroj por tre diversaj lingvoj troviĝis tie. Ili pravas jam per si mem la disvastigitecon de nia lingvo. Porblindulaj verkoj, la jarlibroj de U. E. A., gvidlibroj kaj folioj el multaj konataj kurac-kaj turismo-lokoj okupis pliajn tablojn.

Granda estis ankaŭ la ekspoziciita materialo pri muzikaĵoj. Ankaŭ en tiu kampo Esperanto gajnis tre valoran teritorion.

Kaj en korrespondado! Intereseĝaj, belaj poŝtkartoj el ĉiuj anguloj de nia terĝlobo plenigis la spacon ĉe la muroj, kiun lasis libera la gazetoj. Serena prediko ŝajnis al mi tiuj tiomoblaj salutoj ŝanĝitaj inter homoj diversrasaj, diversgen-

taj, diversklasaj. Ĉu tio ne estas almenaŭ komenco de popola interfratiĝo? Ili povas sin kompreni, do ili povas amikiĝi reciproke. Jam oni sentas la pulsbaton de venonta pli homa generacio, por kiu laboris, konscie aŭ ne, ĉiuj ĉi skribintoj.

Fine estis elmetitaj glumarkoj, insignoj, kongresinsignoj; la Leipzig'a Foiro reklamaj per siaj simple-artaj afiŝoj. La belaj, en delikata kolornuanco faritaj kongresafiŝoj de l' nunjara kongreso de KEF kaj XI aj Floraj ludoj en Palma de Mallorca altiris forte la atenton.



La Ekspozicio

Mi sentis min en neniu alia loko en tiel agrabla stato ol en la ekspozicio. Regis tie la spirito de genio kaj laboro: genio de l' iniciatinto, kiel li mem sin nomis modeste, kaj laboro de liaj fidelaj disciploj. Ankaŭ iomete da nia laboro, por efektiviĝi tian ekspozicion. Ĉar granda estis la oferemo de la samanoj, kiuj helpis per pruntedono kaj kunlaboro, inter ili unualoke nia «avo» Paŭlo Linarès.

Sidante sub la verda standardo en la fono de la ekspozici

cio, kie freŝaj kreskaĵoj kreis verdan atmosferon, mi devis pensi pri la ideala forto de nia movado, kiu dum relative tre mallonga tempo jam estigis tian literaturon, kaj mi fieretis—sen aĉa senco—ke ni malmultaj Kordovanoj preskaŭ tute el propra forto povis elmontri al la urbo, al tuta Andaluzio, ke Esperanto vivas, kreskas kaj floras!

Mi ne esperas, ke mi enuigis vin per la vortoj pri nia ekspozicio, mi male esperas, ke ili eble instigos unu aŭ alian, pli sin dediĉi ol ĝis nun al la studado de nia esperanta librara riĉaĵo.

VIZITO LA URBON, MUZEON, MOSKEON

Post la oficiala inaŭguracio de la ekspozicio okazis granda fotografado, kiun miaopinie la fotografisto devis pli orde aranĝi. Poste promeniro tra la urbo, kies tipaj mallarĝaj stratoj, al kiuj malfermiĝas ofte vere pentrindaj kortoj, tre plaĉis al la gastoj. Ni admiris en la spacoza «oranĝarba korto» la katedralan turon, kiu gracie kaj facile leviĝas alten kaj nokte transformiĝas en lumturo de la urbo; la majestajn, fierajn, susurantajn palmojn kaj la brilverdajn oranĝujojn, en kies foliaro ankoraŭ tie kaj tie flavbriletis forgesita oranĝo. Antaŭ la enirpordego fotografado. Kaj por ĝin diri jam nun, elirante ankaŭ.

La Moskeo—la nomo mahometana ĝis hodiaŭ ne mortis, kontraŭe ĝi estas pli ofta ol la oficiala «katedralo»—ensorĉigas ĉiun, kiu enpaŝas ĝin unuafoje. Eĉ al niaj andaluziaj amikoj, kiuj ja estas kutimitaj pli ol aliaj vidi restintajn konstruonumentojn el maŭra epoko, okazis la samo. La klarigo estas simpla: ĝi estas unika en la mondo. Kolonoj kaj ĉiam denove kolonoj kun la karakterizaj arabaj hufoferaj arkoj prezentiĝas al la miranta okulo. En la longetenditan vastecon de la navoj migras la rigardo. En duonlumo kuŝas la niĉo de l' Korano, «el Mihrab», mistera, ombra, ĝin ĉirkaŭas riĉe skulptitaj kolonoj, kaj sur la muroj kvazaŭ brodaĵoj vidatiĝas la strange belaj signoj de araba skribo.

La gvidadon de la vizitantoj esp istaj tre afable estis preninta sur sin lia kanonika moŝto s-o Juan Lopez de la Manza-

nara. Li kondukis, montris kaj klarigis tre detale. La trezoroj de la sakristio estis malslositaj al ni, oraj kaj arĝentaj vazoj kaj kalikoj inkrustitaj per altvaloraj ŝtonoj, en speciala domo la mirakle bela monstranco ogivstila el la XVIa jarcento de Henriko de Arfe, ebura krucifikso de Alonso Cano, ne granda, sed tiel subtile ellaborita, ke oni mire rimarkas eĉ la streĉitajn, elstarajn vejnojn de l' dia krucumito.

Ne povas esti mia tasko kiel simpla raportisto nun laŭorde nomi ĉiujn viditajn juvelojn. Ŝajnas al mi, ke ĉiuj forportis fortan impreson pri la majesteco de la nekomparebla maŭra monumento kaj ĝiaj riĉaj trezoroj. Kaj vere, oranĝarba korto kun siaj balauciĝantaj palmoj, siaj plaŭdetantaj fontanoj, kaj la moskea kolonlabirinto neniam plu forviŝiĝas el la memoro de tiu, kiu unufoje nur povis ilin vidi kaj admiri.

Tra stratetoj, kiuj nenion perdis ankoraŭ el sia duonaraba, duonkristana ĉarmo, tipaj al Kordovo, ni direktis nin al la Provinca Muzeo de Belaj Artoj, kies direktoro mem, s-o reĝa komisaro Enrique Romero de Torres nin gvidis. Pli kompetentan, pli afablan, pli komplezeman mentoron ja ni ne povis trovi. La muzeo ne estas tre ampleksa, sed enhavas tamen majstroverkojn el hispana pentrarto kaj skulptarto; Murillo, Goya, Valdes Leal, jen nomoj pruvantaj la bonecon de la viditaj artaĵoj.

Apartan plezuron ni povis ĝui, dank' al la komplezemo de l' muzea direktoro. Li lasis nin eniri la privatan laborejon de sia famkonata frato, la pentristo. Du originalajn pentraĵojn liajn ni admiris tie.

Cetere tiu artistejo estis ege interesa; ĝi alproksimigis nin multe al la genia andaluzia majstro.

En la korto de l' muzeo, rava loko kovrita de floroj kaj arboj, Don Enrique propramane tranĉis rozojn, por donaci ilin al niaj sam-aninoj.

Kunveninte post la vespermanĝo en la kongresejo, oni elektis aklame la kongresestraron por la kunsidoj. La rezultato estis: prezidanto: s-o Francisco Azorin - Córdoba; viceprezid, s-o C. Martinez - Sevilla; sekretarioj: s-oj J. Berger kaj J. Serrano Olmo - Córdoba. Ankaŭ la proponon de s-o A. Valdepeñas - Barcelona pri «Esperanto-ŝlosiloj por 10 centimoj» oni

povis jam decidi neoficiale laŭ tio, ke laŭ diro de s-o Mangada ĉe firmo en Madrid, troviĝas ankoraŭ kelkaj miloj da tiaŝlosiloj disponeblaj. Ili atendas nur aĉetantojn.

Je noktomezo proksimume oni disiris. La unua kongres-tago pasis. Ne multbrua, plena de pompaj ceremonioj ĝi estis; male, ĝi havis iun modestan, sed tre intiman, familian karakteron, kiel decas al esperanta festo. Kaj - mi ne aŭdis plendojn. Kelkaj kaŭzetoj ja ekzistis. Ekzistis ne pro malbonvolo, sed pro la cirkonstancoj. Tial certe ĉiuj indulgis.

DUA TAGO

11^a DE MAJO 1925

UNUA LABORKUNSIDO

Ĝi komenciĝas je la 10 matene en salono de la kongrejsajo. Prezidas s-o Azorin. La tagordo estas jena:

- I. Aliĝa statistiko.
- II. Novaj salutoj leteraj aŭ telegramaj.
- III. Konfederacio iberia aŭ hispana asocio.

La sekretario donas resumon pri la 1^a punkto. Aliloke ni publikigas la statistikon. Poste li legas la dume alvenintajn salutleterojn kaj telegramojn, pri kiuj mi jam parolis okaze de la malferma kunsido, kaj ili estas akceptataj kun aplaŭdo.

Oni nun ekdebatadas pri la organiza demando, ĉefpri-traktendaĵo de l' kongreso. S-o MANGADA konmuikas la proponon de la Madrida grupo pri starigo de *nacia societo*, ĉar pro la sintenado de K. E. F. ia konfederacio iberia ne havas verŝajnecon iam efektiviĝi. Legas el Kat. Esp. paragrafojn tion pruvantajn. Vaste li skizas la strukturon de *nacia societo*, kiu lasas plenan liberecon al grupoj, jamaj aŭ estontaj federacioj regionaj aŭ izolaj esp-istoj.

S-o LINARES demandas pri la antaŭ Societo p. propono de E. kaj Zamenhofa Federacio, kaj MANGADA klarigas respondante la historion pri ilia malapero.

S-o MANGADA proponas al la kongreso: «Starigon de

memstara asocio (societo, federacio) hispana sur la bazo de la regularo ellaborita de la Madrida grupo kiu estu provizore akceptota.»

La prezidanto petas opiniojn por kaj kontraŭ. Kontraŭparolas s-o MAYNAR - Zaragoza, bedaŭrante la enŝoviĝon de, kvankam senkonscie sentataj, politikaj opinioj kaj konvinkoj en la esperantan movadon. Li diras ke la forigo de la Konfederacio Iberia decidita kaj konfirmita en ĉiuj antaŭaj kongresoj estas domaĝo. Ni daŭrigu en la malnova formo.

Respondas s-o BERGER dirante ke konservativismo facile povas konduki al rigidiĝo kaj ke ni devas agi kaj organizi nin laŭ la ŝanĝitaj cirkonstancoj. Legas el la letero de s-o Saldanha Carreira, del. U. E. A. en Lisboa, ke ĉiuj dokumentoj koncerne starigon de portugala asocio jam estas pretaj, sed pro manko de sidejo estas prokrastata ankoraŭ la necesa propagando. Do, pli-malpli baldaŭ ekzistos portugala esperanta asocio. La kataluniaj esp-istoj organizitaj en Kef, havas jam sian nacian federacion kaj *ne deziras* aparteni al Konfederacio Iberia. Do, ĉu ne estus kontraŭlogike kaj ne koresponde al la faktoj, se la hispanaj esp-istoj daŭrigus *iberian* kanfederacion, en kiu partoprenas nek portugaboj nek katalunoj?

S-o FR. SERRANO ankaŭ subtenas nacian organizaĵon.

S-oj MANGADA kaj LINARES parolas pri nacia teritorio de U. E. A.

S-o AZORIN diras, ke nacia teritorio de U. E. A. kaj nacia asocio ne estas egalaj, sed ankaŭ ne malebligas unu alian.

S-o ROCAMORA - Barcelona rakontas la historion de Udkeilo kaj Dudkeilo kaj proponas la preparolon de la organiza demando al la venonta kongreso.

Diversaj ĉeestantoj protestas.

La vicprezidanto rimarkigas ke estas jam plej urĝa tempo por tagmanĝi, ĉar je la 2^a forveturos la aŭtobusoj al la montaro, kaj restas apenaŭ unu horo.

Do, oni interrompas la kunsidon, por daŭrigi ĝin post reveno de la montara ekskurso.

Mi ĉi tie unue finos la raporton pri tiu plej grava kunsido de la kongreso.

DUA LABORKUNSIDO

Rea komenco: 6,30 vesp.

Ĉeestis malpli da kongresanoj, sed ĉiuj rajtigataj delegitoj.

La prezidanto resumas kaj voĉdonigas, ĉar antaŭtgm. oni detale kaj sufiĉe priparolis ilin, la du ĉefajn proponojn:

1) *Esp-ista Konfederacio Iberia.*

1 voĉo — (s-o Maynar.)

2) *Hispana Esperanto-asocio.*

14 voĉoj (Azorin, Berger, Iznardo, Linarês, Luque, Martinez, Mangada, Marivela, Perez, Rubio. F. Serrano, Juan Serrano, Soto, Juan Serrano rajtigita delegito por Jaen.)

Sin detenis:

4 (Anguiano. Bausells, Campos, Rocamora.)

Do estas akceptita per voĉplimulto propono 2: Hispana Esperanto asocio (H. E. A.)

S-o MANGADA klarigas nun en longa, detala parolado la esencan, la regularon kaj la funkcion de la nova organizaĵo.

Li diras ke la Konfederacio Iberia efektive tute ne ekzistis oficiale, ĉar ĝiaj statutoj ne estis aprobitaj de la registaro. Do, ni ne faris atencan kontraŭ ĝi. La nova formo estas pli malpli nur ŝaŭgo de l' nomo kaj koncentriĝo. Kompare kun la antaŭa regularo ĝi prezentas la grandan avantaĝon, ke en ĝi oni starigis «Hispanan Esperanto Instituton», kies principa tasko estos propagando diversmaniera, instruo, aranĝo kaj faciligo de ĉieaj kursoj, unueca sistemo de ekzamenoj kun speciala tiucela regularo ktp. Landajn limojn ne fiksas H. E. A. Hispanoj havas la moralan devon aliĝi, ĉiu alia povos esti membro akceptante la regularon kaj plenumante ties devojn.

Li parolas pri la konsisto de l' estraro ktp, kaj rekomendas la studadon de la regularo ĝis la venonta kongreso, kie oni povos ĝin definitive aprobi kun eventualaj tie deciditaj ŝanĝoj.

S-o BERGER proponas, ke la Madridanoj tuj multobligh kaj dissendu ĝin al ĉiuj grupoj, federacioj kaj del. de U. E. A. en Hispanujo, kion MANGADA promesas.

La kunsido konsentas, ke la regularo provizore estas akceptita tutamplekse.

Pri la kotizo oni decidas jenon:

Membro	pojare 3.—ptoj
M.-abonanto	» 6 — »
familiano	(sen gazeto) 1.— »
de membro	

Pri kotizoj internaj de grupoj kaj federacioj ne okupas sin H. E. A. lasante planan liberecon.

Nepra devo de ĉiu hispana esp-isto estas aparteni al H. E. A., por ke ĝi estu voĉdonrajta en K. R. Tial la Madrida Grupo, kiu provizore direktos la asocion, tuj sendos certan sumon al la kasisto de K. R. por ke H. E. A. estu reprezentata jam en la Ĝeneva kongreso nunjara.

Oficiala gazeto estos «La Suno Hispana» kiun oni celos pliriĉigi kaj pliampleksigi per literaturaj aldonoj, donante en ili eblecon por publikigi siajn verkojn precipe al jnnaj verkistoj. Honora devo de ĉiu H. E. A.-ano estas abonon, abonigi kaj subteni la «Suno'n Hisp.» Krome oni klopodos ankaŭ, eldoni jam tradukitan verkaron de J. Benavente kaj aliaj bonaj aŭtoroj.

S-o MANGADA invitas la venontan kongreson al Madrid, plej centra loko de la duoninsulo. Oni akceptas unuanime.

Post mallonga diskuto pri la plej taŭga tempo oni lasas la decidon al la aranĝontoj. Krome oni decidas, nomi la proksiman kongreson «6a hispana Esperanto kongreso» oficialigante kiel kongresoj ankaŭ la Uuan Diskutantan Kunvenon de Esperantistoj el Iberiaj Landoj (Udkeilo) en Barcelona kaj la Duan (Dudkeilo) en Zaragoza.

Je la 8^a h finiĝas la kunsido, kiu post viglaj, valoraj diskutoj rekonantaj tiel la gravecon de la hispana organizado aŭ reorganizado, kavigis al ni la suprajn decidojn. Kaj mi ĝoje konstatas, ke, laŭ la antaŭparolo en la kongreslibro, Kordovo fariĝis la hispana Helsinki. Estu H. E. A. la kampo de frukto-donaj laboro kaj progreso!

EKSKURSO AL LA MONTARO

Kvankam mi ne povis partopreni tiun ekskurson okazintan la 11^{an} de majo, de la 2^a ĝis la 5^a posttagm, mi povas tamen raporti pri ĝi laŭ rakontoj de ekskursintoj kaj ĉar mi konas la vizititan lokon, la «Huerta de los Arcos» (Bieno de la arkoj).

Per aŭtobuso foriris la plimulto. Post dudekminuta veturo sur la tute rektlinie ascendanta ŝoseo oni atingas la finponton de la aŭtobusa linireto, «Vista alegre» (Gaja videjo). Kaj vere, gaja bildo prezentiĝas al la okuloj, kies rigardoj etendiĝas super olivarbaj kampoj, impresigaj eŭkaliptujoj, en verdaĵo preskaŭ dronantaj blankaj kampdometoj. Oni marŝas piede dek minutojn, kaj jen oni troviĝas ĉe la surdekliva bieno, kiu estas samtempe bonege kulturita ĝardeno kaj parko kun saltantaj fontanoj, ombraj ĉarmaj loketoj en duongroto hedere surplektita, bonodoregaj oranĝarboj, kiuj tiam ĝuste floris kaj rozoj, blankaj, ruĝaj, flavaj en admirinda multeco, en seuŝpara abundeco.

La ĉefdomo konstruita en pura maŭra stilo kun antaŭaj hufoferaj arkoj donis la nomon al la bieno. La salonon kaj manĝoĉambron, ambaŭ meblitaj kaj ornamitaj laŭarabe, oni povas viziti. La salono havis kiel modelon la koran-niĉon (Mihrab) en la Kordova Moskeo.

Antaŭ la domo, sub palmoj, pinoj, cipresoj araŭkarioj, la ravita okulo ĝuas belegan vidaĵon. Ĉe la piedo de la montaro kuŝas Kordova, brilas la suno sur ĝiaj blankaj muroj, ĝiaj plataj tegmentoj. Ĉe la suda flanko serpentforme fluas la Gualkiviro, kaj briletas liaj akvoj kvazaŭ arĝento, kaj

«.. la urbo maŭra ripozemon spiras ..»

Sur la montdeklivoj staras ĉie verdaj olivarbaroj; tie kaj tie leviĝas el inter ili larĝbranĉaraj pinoj, agrable nuancigante la iom unutonan verdon. Kaj supre volbiĝas ĉielo en intensa bluo.

Ĉe la plej alta parto de la bieno ekzistas malgranda kaverno en la roko, en kiun oni metis sidantan figuron de mo-

naŭo el ligno. Precipe por la infanoj ĝi estas ĉiam objekto de sekreta timeto, ĉar enirante oni venas en mallumon, el kiu nur malklare reliefiĝas la monaĥa vizaĝo.

Krome apud la biendomo oni povas vidi aŭtentikan romanan mozaikplankon, kiun alportigis ĉi tien mi ne scias kiu el mi ne scias kie. Ne gravas.



En la Montara Bieno «Huerta de los Arcos»

La vizitantoj tie fotografiĝis kaj entute pasigis tie belau posttagmezon.

La dua aranĝo kun amuza karaktero tiutage estis ĝenerala kunveno post la vespermanĝo en kafejo «Gran Capitan» kie oni gaje babilante, ŝercante, kafetrinkante kaj aŭtografojn en la kongreslibroj skribants restie ĝis post la 11^a h. Tie, kiel cetere ĉiam dum la tuta kongreso estis parolata nur Esperanto.

TRIA TAGO

MARDO, 12^a DE MAJO 1925

10^a h mat.

TRIA LABORKUNSIDO, FERMO

La prezidanto formulas rezolucion kiun oni aprobas kaj decidis sendi al la registaro pere de la guberniestro.

Jen ĝia teksto:

Via ekscelenca moŝto, s-o prezidanto de l' Militista Direktorio.

La subskribintoj nome de la III^a Iberia Kongreso Esp-ista okazinta ĵus en Kordovo sub la prezido de la aŭtoritatoj kaj reprezentantoj de la kulturcentroj de la urbo havas la honoron transdoni al vi la deciditajn rezoluciojn rilatantajn al la alta Direktado de la Ŝtato:

1^e Ĝi starigu iom post iom oficialajn Katedrojn de la internacia helpa lingvo Esperanto en la Gimnazioj, Porinstruistaj kaj Komercaj Lernejoj, transprenante tiun kulturagadon, kiu nun estas tasko de la Esperantistaj grupoj laŭ R. O. de 27^a de Julio 1911.

2^e Hispanujo proponu oficialan interŝtatan konferencon decidantan fine la lingvan demandon en la interrilatoj internaciaj de ĉiu speco, diplomaciaj, sociaj, kulturaj, komercaj k. c.; ĝis adopto per komuna interkonsento de la neŭtrala helpa idioma internacia Esperanto oni uzadu en ĉiu internacia kunveno nian noblan lingvon famhistorian, parolatan de du-dek florientaj ŝtatoj.

3^e En telegrafado oni oficialigu la uzon de Esperanto kiel klara lingvo flanke de la diversaj naciaj nuntempe permesataj.

(Sekvas nun la klarigoj, motivoj kaj argumentoj por la supraj 3 paragrafoj, kun cito de la jamaj oficialaj Ordonoj, Dekretoj kaj Decidoj)

Subskribis:

FRANCISCO AZORIN
prezidanto

JOSEPH BERGER
sekretario

Sekvas la diskuto pri la alvenintaj proponoj:

A. De Grupo Esp-ista Pacense, Badajoz ĝia delegito s-o Luis Campos klarigas ilin.

1) Elmeto de afiŝkartegoj nacilingvaj, kiuj sciigas pri nomo, sidejo kaj kunvenoj de la koncerna grupo. Oni elpendign ilin en stacidomoj, poŝtejoj, hoteloj, tramoj ktp.

La kunsido provas la ideon kaj rekomendas imiton.

2) Kolekto de ĉiuj dokumentoj pri Esperanto kiel klara telegrafa lingvo; peto al la registaro ĝin rekoni tia.

Decido: la unua parto de la propono estos afero de l' Instituto ĉe H. E. A.; la duan oni efektivigas per sekvanta petokribo al

a) Lia moŝto s-o ministro de Gubernado.

b) » » s-o ĝenerala direktoro de Komunikado.

«La 3^a Iberia Kongreso Esp-ista okazinta ĵus en Kordovo kun ĉeesto de la ĉefaŭtoritatoj kaj kunlaboro de la altaj kultur organizaĵoj de la urbo decidis peti vin pri la akcepto de la internacia helpa lingvo Esperanto kiel klara lingvo en telegrafado.

Oni motivas tion per jeno:

1^e Estas morala devo de Hispanujo realigi la decidojn de la L. d. N. ĉar ĝi ja estas ligano kaj tiu en ĝenerala kunsido de 20-9-1924 decidis unuanime rekomendi ke la ŝtatoj konsentu al Esperanto la traktadon kaj tarifojn de lingvo «klara» en telegrafaj kaj radio-telegrafaj interrilatoj, kiel praktika helpa lingvo de la internaciaj interkomunikoj flanke de la naciaj lingvoj uzataj. Ĉi tiu decido estas jam aplikata en Svisujo, la originlando de la Universa Poŝta Unio, depost 1-1-1925.

2^e Ekzistas R. O. 27-7-1911 deklaranta «oficiala merito» la konon de Esperanto kaj permesanta ĝian instruon en la oficialaj Lerninstitucioj de la Ŝtato, kaj alia R. O. 8-9-1916 deklaranta «utila kaj praktika» Gramatikon Esperantan kaj alia R. O. 16-4-1912 premianta per honora mencio Lernolibron, kaj kelkaj R. O. honorantaj per ordeno la elpensinton de Esp. d-on Zamenhof kaj nomantaj oficialajn reprezentantojn por ĉiuj universalaj esperantaj kongresoj.

Konsekvence estas nelogike malpermesi la uzadon de Esperanto en ĝiaj naturaj funkcioj de publika interrilatado, kaj

tial ĉi tiu esperanta kongreso decidis peti de vi la supre nomitan permeson.

Dio gardu vin multajn jarojn.

Kordovo, 15^{an} de Majo 1925.

La prezidanto

La sekretario

FR. AZORIN

JOS. BERGER

3) Kolekto de ĉiuj fremdnaciaj oficialaj dokumentoj rilatantaj Esperanton.

Decido: Same tio estos afero de l' Hispana Esperanto Instituto, kiu kolektu ankaŭ la naciajn ĉi-rilatajn dokumentojn.

S-o Campos krome petas la opinion de l' kongreso pri tio, kiel oni povas fari fidindan statistikon, ĉar multaj esp-istoj apartenas al diversaj societoj.

Oni ne decidu, sed opinias, ke se en la statistiko de ĉiu societo aperas la efektivaj anoj, tia statistiko estas plenfidinda. Adresarojn oni eldonis antaŭe; eble oni povos reeldoni.

B. De s-o Berger, pri ekzamenoj.

Li mem retiras tiun proponon, transdonante ĝin al H. E. A. por enigi ĝin en la regularon por ekzamenoj, se ĝi estas aprobinda.

C. De s-o Valdepeñas - Barcelona pri ŝlosiloj. Oni oficiale aprobas la jam antaŭe faritan decidon (dimanĉon vespere). Samtempe komunikas s-o MANGADA, ke ankaŭ estas aĉetebaj ankoraŭ la plej bona propaganda broŝureto: «Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj, raporto de l' ĝenerala sekretario» en hispana lingvo. Oni turnu sin al: Reloj, 1 - Córdoba, adreso de s-o Juan Serrano Olmo.

Laŭ ĝenerala propono oni decidu sendi saluttelegramojn al Scienca kaj Komerca Konferenco, ambaŭ en Parizo kaj al la hispanaj reprezentantoj en ili. Jen la tekstoj:

«Rolleto de l' Isle.—Sorbonne.

Estu bonsukcesa scienca konferenco.—III^a Iberia Kongreso Esperantista».

«Andres Piñó.—20, Arc de Trioumphe.

Tria Kongreso Esperantista Iberia salutas dezirante plenan sukceson al komerca konferenco kaj favoran decidon al Esperanto.—III^a Iberia Kongreso Esperantista».

«Torres Quevedo.—Sorbonne.

Saluton al niaj reprezentantoj kaj la konferenco. Bon-sukceson.—III^a Iberia Kongreso Esperantista».

Dume fariĝis tagmezo, kaj la prezidanto per malmultaj adiaŭsalutaj vortoj fermis la oficialan parton de l' kongreso, al kiu sekvis la

FESTENO

Ĝi kunigis lastfoje en Kordovo la gekongresanojn, ĉar poste multaj jam forveturis al Seviljo, kien sekvantan tagon oni ekskursos. La festenon organizitan de Esperantista Grupo Kordova, partoprenis la reprezentantoj de la loka gazetaro kaj kiel honora gasto kaj prezidanto majoro s-o Rafael Sanchez Gomez. reprezentanto de la estraro de l' «Circulo de la Amistad».



Samideanoj kaj ĵurnalistoj kiuj, inter aliaj, partoprenis la festenon

Parolis la kongresprezidanto s-o AZORIN, dankante la lokan gazetaron kaj admonante ne ĉesi la subtenon al la idea la afero de Esperanto, kiu samtempe estas ege praktika.

S-o SANCHEZ GOMEZ diris, ke jam la nomo de l' kazi-
no «Rondo de amikeco» montras, ke ĝi volas servi al kultura-
do de puraj sentoj, ke do ĝi plene simpatias kun la esp-istoj,
kies celo estas internacia kunfrateco helpe de komuna lingvo,
kaj ke eĉ estis honoro por la rondo, ke en ĝi estis instalita la
esperanta ekspozicio kaj festata la kongreso.

S-o MANGADA rememorante pri Kubo, sia hejmlando,
montris elokvente la kunigan forton de Esperanto, per kiu ĉie
oni trovas fratojn celantajn la saman idealon, kaj kiu tamen
neniel detruas la amon al la hejmlando. Neniam li sentas sin
pli hispano ol estante eksterlande.



Grupo de kongresanoj en la bela korto de Rondo de la Amikeco

S-o ROCAMORA salutis la ĵurnalistojn kiel samprofesia no kaj parolante pri la diversaj antaŭaj kongresoj li diris, ke la venonta en Madrid estos la krono. Laŭdegante li menciis la belaĵojn de Kordovo kaj Andaluzio, kiu tute nemeritite estas kelkfoje nomata aliloke inerta kaj nelaborema. Li estonte ne nur estos amiko de Andaluzio kiel ĝis nun, sed ĝia fervora propagandisto en Barcelona. Elokvente li citis la grandan nombron da katalunaj poetoj, muzikistoj kaj pentristoj, kiuj sciis kompreni kaj enprofundiĝi en la nekompareblan animon andaluzan.

Fine s-o MAYNAR per ŝerca anekdoto el la Radio-sfero ilustris la nepran neceson de Esperanto por universa interkompreniĝo.

Kordova esp isto s-o MARIVELA ankaŭ dediĉis kelkajn sincerajn vortojn al la festenantoj.

Ĉiuj oratoroj rikoltis riĉan aplaŭdon.

Post la festeno fotografado.

VIZITO TRA LA URBO

Sub la lerta kaj sperta gvidado de s-oj Sanchez Gomez kaj Sarazá Murcia kelkaj esp-istoj vizitis la plej tipajn kaj pentrindajn placojn kaj angulojn de la urbo (Placo de la Doloroj, palaco de l' markizo de Viana, placo de Santa Marina k. c.) Kiel mi jam diris, multaj forveturis posttgm, jam Seviljon. Tial la noktkunveno en kafejo havis malmulte da ĉeestantoj kaj finiĝis baldaŭ.

Kaj morgaŭ, en Seviljo! Jam unufoje estinte tie, mi ĝojis revidi la urbon de la serena gracieco, kie krom tio mi havas inter la esp-aro amikojn sincerajn kaj—eble—ankaŭ amikinojn.

MERKREDO, 13^a DE MAJO 1925

AL SEVILJO!

Matene kolektiĝis en la stacidomo de Kordovo grupo da gesam-anoj, por iri Seviljon, kie la tiea esp-istaro aranĝos postkongreson, kiu promesis esti bela, brila fino de la III^a Iberia; almenaŭ ni ĉiuj havis tian antaŭsenton. Kaj, por ĝin diri anticipe, niaj esperoj kaj atendoj esti plenege kontentigitaj,

pli eĉ, la restado kvankam nur unutaga, en Seviljo superis ilin.

La vagonaro kondukis nin ne tro rapide preter blankaj vilaĝoj kaj urbetoj, iafoje kun superstaranta kastelo tra la fruktoriĉa ebenaĵo de l' Guadalkiviro al Seviljo, industria kaj komerca ĉefloko de Andaluzio, havenurbo en la landinterno kun vigla ŝiptrafiko. En la stacidomo atendis nin jam la seviljanoj, kaj aliaj antaŭveturintaj samideanoj. Kora intersalutado, manpremado. Ĉi tie ni povis konatiĝi kun la eminenta angla sam-ano s o inĝ. Lechmere Oertel, kiu antaŭtage estis dum du horoj en Kordovo, sed tuj pluveturis Seviljon.

Antaŭ la stacidomo minacis nin la nigraj kestetoj de fotografistoj. Do, nenia savo alia, ol lasi nin fotografiĝi. Kaj tiel fariĝis.



„Kongresanoj alvenantaj en Seviljon

Poste la esperantistaro direktis siajn paŝojn al la Muzeo de Pentraĵoj, kie la fama pentristo seviljana D. JOSÉ RICO CEJUDO afablege estis preninta sur sin la taskon nin gvidi kaj per vivaj paroloj doni klarigojn pri la antikvaj kaj mo-

dernaj pentrajaj trezoroj. S-o MANGADA rapide kaj bonege tradukis esperanten

Kion mi diru pri la Muzeo? Ankaŭ se mi volus priskribi ĝin detale, mi ne povus, ĉar mankas al mi kono, scio kaj povo. Do nur kelke da tute personaj impresoj. La ampleksa Murillo salonego, kie troviĝas konsiderinda nombro da liaj plej maturaj kreaĵoj, certe ne havas similan kompareblan, ĉar nur en la urbo de la granda majstro ekzistas tia kompleta kolekto.

Post la vizito, kiu plenigis niajn cerbojn per multaj novaj priartaj impresoj, ni serĉis niajn manĝejoj. Necesis for-tigi nin ĉar dum posttagmezo atendis aliaj vizitoj.

La unua estis dediĉita al la katedralo kun la mirinda sevilja, karakteririlo la turo «Giralda». Parte oni rimarkas ankaŭ tie la originan araban moskeon, ankaŭ oranĝarba korto akzistas, kvankam malpli bela ol la kordova (pardonu, seviljanoj!) La katedralo, tre ampleksa konstruaĵo, montras 6 diversajn stilojn. Interne ĝi imponas per siaj altaj potencaj kolonoj, Trezoron ĝi enhavas, ne el oro, ne el dia mantoj; sed eterne daŭran: estas la tombo de Kristoforo Kolumbo!

Nia gvidanto, samideana pastro D. Ildefonso Montero, vidigis al ni ankaŭ la trezorejojn kun tre valoraj relikvaĵoj kaj tre artoplenan monstrancon el arĝento.

Tiu inter ni, kiuj ne timis la lacigon, supreniris la Giraldo'n. La turo havas nek internan, nek eksteran ŝtuparon, nek homlevilon. Do, ĝi prezentas samtempe enigmeton. La solvo estas, ke en ĝi kondukas supren oblikva brikpavimita vojeto; tio tute ne lacigas tiom la vizitanton kiom ŝtupoj. Ĉe ĉiu pli alta etaĝo pligrandioziĝas la malsupre etendiĝanta panoramo. Seviljo ripozas ĉe kaj ĉirkaŭ sia katedralo, vasta, larĝega doma maro, borderita de arboriĉa parkaro, trafluita de l' riverego Guadalkiviro, kiu jam kapablas porti ne malgrandajn ŝipojn sur sia larĝa dorso. Sed Seviljo, la gracia, la svelta Seviljo havas sian veran simbolon, sian realan enkorpiĝon en tiu mudeĥar stila turo, duonmaŭra, duonkristana arkitekturkuniĝo. Mi devis pensi pri soneto, kiun mi foje esperantigis:

LA NOVIA DEL SOL

Sevilla, la morena triunfadora,
hija fué de una mora y de un gitano;
y en sus venas aun guarda el sevillano
el rojo fuego de su sangre mora.

A Sevilla, flamenca y soñadora,
amaba el Sol, ardiente y soberano,
que su ofrenda de amor, mandóle en vano
con besos de su luz deslumbradora.

Y sus rayos, el Sol, una mañana
petrificó, por ígnea maravilla,
haciendo una mantilla sevillana;

y es la blanca Giralda la mantilla
con que, altiva y airosa, se engalana
la cabeza gitana, de Sevilla.

JOSÉ GARCÍA RUFINO.

LA FIANCINO DE L' SUNO

Seviljon, brunulinon triumfantan
maŭrino kreis ame kun cigano;
konservas en la vejnoj seviljano
la maŭran sangon ruĝe fajrbolantan.

Seviljon vivogajan kaj revantan
la Suno amis, arda ĉielano
kaj kiel am-oferon, sed en vano,
kun kisoj sendis lumon blindigantan.

Kaj Suno, de radioj siaj brilon
iumatene fajrmiraklo faras,
teksante por Seviljo ŝtonmantilon

kaj jen, Giraldo altaere staras;
majestvuale kronas ĝi Seviljon,
kaj ties kapo ciganina klaras.

J. B.

(Dediĉata al la ĉarmaj seviljaninoj).

Poste, ĉiam gvidate de nia oferema pastro s-o Montero, ni vizitis la multampleksan domaron kun belaj kortoj de la Hospitalo, en kies preĝejo ni alian fojon povis admiri majstro-pentraĵojn de Murillo, troviĝantajn ankoraŭ en la sama loko, por ĉiu ilin kreis la magia peniko de l' pentristo. Ankaŭ unu el la plej kortuŝaj pentraĵoj de l' kordoba majstro Valdes Leal estas tie. Mi, nekonante ĝian titolon, nomus ĝin: «Sic transit gloria mundi!»

Poste dividiĝis la vizitataro Duono sin direktis al la parko Maria Luisa, la ceteraj, inter ili mi, volis vidi la Alkazar'on. Kaj mi ĝojegas pri mia tia decido. Vizito al ĝi estas kompletigo de la Kordova Moskeo, de la Granada Alhambro. La maŭraj arĥitekturistoj estis poetoj skribantaj per ŝtonoj, brikoj kaj gipso kaj esprimantaj sian entuziasmon, sian diadoron, sian vivoĝojon, sian heroecon per belformaj kolonoj, brodaĵsimilaj plafonoj; stalaktitaj araneaĵoj, potencaj hufoferaj arkoj. Mi ne kredas, ke iu povas resti netuŝita de tia grandioza esprimova arĥitekturo.

Ĉar oni nin atendis ĉe la Ekspozicio Iber-amerika, ni devis rapidi, ne povante refreŝigi nin per glaso da biero, kiel ni sopire intencis. Ni—tiuokaze—estas la angla sam-ano s-o Lechmere-Oertel kaj mi. Li tre afable sciigis min pri multaj interesaĵoj el Hindujo, kvankam mi eble tro scivoleme lin eldemandis.

La ekspoziciajn konstruaĵojn kiel ankaŭ la en ili elmetitajn modernajn pentraĵojn ni ne povis tre detale rigardi kaj admiri; ĉar fariĝis malfrue, kaj manĝeto («lunĉo») preparita de la Ekspozicia Komitato je nia honoro atendis nin. La loko por ĝi estis la imageble plej ĉarma. Verando de palaco—por Arto Antikva—ĉirkaŭita de la arboj kaj arbustoj de l' parko Maria Luisa; kien ajn la rigardo falis, estis floroj kaj milda verdo. Certe oni ankaŭ paroladis, por esprimi la grandan dankon al tiaj afablaĵoj de l' Komitato. La oratoroj estis: D. Manuel Iz-nardo nome de la esp ista grupo seviljana kaj D. Fr. Azorin kiel prezidanto de l' kongreso. Respondis al ili la sekretario de l' konstanta ekspozicia komitato, s-o Mañez Jerez, salutante la kongresanaron kaj tre favore parolante pri Esperanto kiel kultur-akcela lingvo. Viglaj aplaŭdoj.

Sed ankoraŭ ne finiĝis la programo preparita de niaj seviljanaj gesam-anoj. Nokte okazos tipa festo andaluza, Majkruca festo. Ĝi estas rememorigo pri la trovo la krucon de Jesuo Kriste per imperiestrino Helena, festata oficiale de la katolika eklezio la 3^{an} de majo. Post kelke da tre amuzaj aventuroj survoje al la festo, kiujn mi silentas pro spacmanko, nia grupo eniris la festsalonon. Jam sur la strato ni estis aŭdintaj la bruetadon de klakantaj kastanjetoj kaj la susuron de homvoĉaro. Sur la sojlo ni haltis surprizite. En la fondo la arte sur scenejeto instalita Maja Kruco, la plafono ornamita



Majkruca festo organizita de Sevilja Esperantista Grupo

per paperoj kaj tukoĵ gajkoloraj, kaj-kiel floroj la dancantaj esp-istinoj vestitaj per la tipaj seviljaninaj roboj. Ĉio ĉi kune prezentis bildon tiel vivan, tiel veran kaj tamen tiel neverŝajnan, ke mi vidante ĝin nur bilde dirus, ke estas nura teatra aranĝaĵo. Dancistinoj, kaj gedancantoj nelacigeble montris sian arton. Tre allogaj estis la klasikaj «seguidillas» montrantaj okulfrape la graciecon, la flekseblecon kaj la belajn korpoliniojn de la virino el «la tero de la virgulino Maria plej sankta.» Virĥoro kun tre strangaj instrumentoj (campanilleros)

kantis du kanzonojn, kiuj per severa melodio kaj rigida takto tamen vekis grandan sinceran aplaŭdon ĉe la aŭdantaro.

Kaj je la fino—(la seviljanoj vere genie antaŭaranĝis)—venis la «buñolada». Mi tradukas ĝin per «volovanado» laŭ Boirac. Ĝi konsistis el ĉokoladtrinkaĵo kaj «buñuelos» (volovanoj). La karakterizan noton al ĝi donis la esp-istinoj, kiuj mem servis la gesam-anojn.

Sed ĉio bela kaj bona finiĝas, la bela kunesto kun la seviljaninetoj kaj la bona frandaĵo. Venis la horo de adiaŭo, ĉiam malĝojiga, ĉiam malbonvena. Kaj tiom pli, kiam antaŭe oni estis inter samidealanaj amikoj. Tamen.

Jam subtilete ektagiĝanta noktoĉielo volbiĝis super la dormanta urbo, kaj el inter kelkaj nubetoj amindumis pala duonluno kun la suprencelanta silueto de la Giraldo.

Denova disiro. Nia belga, nia ĉeĥoslovaka, nia angla gesam-anoj nin forlasis. Adiaŭ! Ĝis revido!

La morgaŭan tagon rekondukis nin la fervojo Kordovon. La kongreso finiĝis. Definitive!

LA KONGRESO KAJ LA GAZETARO

Estas malnova, ĉie konata saĝaĵo, ke la gazetaro estas nun el la grandpotencoj de l' mondo. Tial mi opinias ne malutile skizi resume ĝian kunlaboron kaj partoprenon ĉe la kongreso. Aliloke mi jam citis kelkajn ĵurnalojn raportintajn; mi ripetas kaj ampleksigas nun la liston.

A. Lokaj ĵurnaloj.

1) KORDOVO.

Diario de Córdoba, Diario Liberal, El Defensor de Córdoba, la Voz de Córdoba.

2) SEVILJO.

El Noticiero Sevillano, El Liberal, La Unión de Sevilla.

3) BARCELONA.

El Diluvio, El Día Gráfico.

B. Tutlandaj.

A B C (kun ilustraĵo), El Sol de Madrid, El Socialista. Kaj kompreneble la esperantaj gazetoj.

C. Revuoj.

Andalucía Ilustrada · Córdoba, Ibérica · Tortosa, kun ilustraĵoj.

La Unión Ilustrada · Málaga, du foje kun 4 ilustraĵoj.

El artikolo «Los Esperantistas almas fraternas» (Diario Liberal, Córdoba, 11-5-1925) mi citas kelkajn liniojn.

«Eble eĉne rimarkante la esperantistoj rimadas la plej belajn strofojn por la kimno al homa interfratiĝo, kiun komencas la Rabeno per jenaj diaj vortoj: Amu unuj la aliajn!

.....
La elpensinto de Esperanto metis, kiom ajn granda estis liaj konoj, multe pli da amo ol scienco en sian verkon....

Kaj jen kial la esperantistoj....

estas frataj animoj, animoj ĝojantaj la intiman plezuron senti sin proksimaj reciproke.

.....
Favarelo.»

Ĉu ni esperantistoj povus pli bele, pli klare skribi pri nia «interna ideo»?

Dankon al ĉiuj el la grandpotenco «gazetaro» kiuj nin subtenis kaj kelpis en nia laboro.

Oni permesis al mi antaŭparoleton, do oni ankaŭ ne neos al mi postvorton.

Skribinte ĉi tiun Kongres-Bultenon, mi ĉesas mian oficon kiel sekretario de la Organiza Komitato kaj de la Kongreso. Dankon al ĉiuj, kiuj iel min helpis. Kaj daŭradu la laborvolemo ekestinta en Kordovo! Ĝi estas la plej forta risorto antaŭen puŝanta nian movadon en Hispanujo kaj ĉie!

La mankojn, kiuj ekzistis—ni ne estas blindaj tiurilate—oni bonvole pardonu. Estu senkulpigo nia ĉiama bona volo. Ĉion kompreni signifas ĉion pardoni.

J. BERGER.

ALIGINTOJ

(Tiuj kiuj ĉeestis la Kongreson, estas signitaj per*)

BADAJOZ

- * 1. S-ro. Luis Campos Suay, Militisto; Hernan Cortés, 11.
- 2. S-ino. Luisa Garcia Garcia; Hernan Cortés, 11.

BARACALDO (VIZCAYA)

- 3. Grupo Esperantista; Carmen, 38.

BARCELONA

- 4. F-ino. Palmira Castellvi, Kantistino; Salmeron, 59.
- 5. S-ro. Delfi Dalmau, Profesoro; Valencia, 245.
- 6. » Francisco Gorgues Torredelflor; Laforja, 16, principal 3.^a
- 7. » Juan Bausells Alsina, Urboficisto; Villarroel, 16, entlo. 2.^a
- * 8. » Manuel Bausells Alsina, Konstrua Entreprenisto; Travesera, 170, pral. 2.^a
- * 9. » Maximino Ribó Maseleu, Rajtigato; Via Layetana, 13, entlo. 1.^a
- * 10. » Rómulo S. Rocamora, Advokato; Via Layetana, 13.
- 11. » José Miró Sabater, Konstruisto; San Luis, 6.
- 12. » Jaime Torner Forn, Direktoro de la Akademio Torner; Ancha, 35, 1.^o
- * 13. » Artur Domenech, Librotenisto; Cabanyes, 81, 1.^o, 1.^a

BILBAO

- 14. Esperantista Grupo; Merced, 1, 1.^o
- 15. S-ro. Eugenio Aresti; Cristo, 16, izqda 2.^o
- 16. » Teodoro Elizondo, ĉe Banko de Vizcaya.

CADIZ

17. S-ro. Juan Kantek, Tajloro; Columela, 16.

CAÑETE DE LAS TORRES (CÓRDOBA)

18. S-ro. Antonio Gonzalez Gutierrez, Elektristo.

CEUTA (CADIZ)

19. S-ro. Pedro Garcia, Telefonisto; Talleres de la Puntilla.

CÓRDOBA

- * 20. S-ro. Antonio Carbonell Trillo Figueroa, Inženiero; Torres-Cabrera, 4.
- * 21. » Francisco Serrano Olmo, Komercisto; Ambrosio de Morales, 10
- * 22. » Rafael Castejon Martinez de Arizala, Profesor, Sevilla, 21.
- * 23. » José de la Torre del Cerro, Arhivisto; Sanchez de Feria, 6.
- * 24. » Rafael Vazquez Aroca, Profesor; Montemayor, 8.
- * 25. » Juan Serrano Olmo, Komercisto; Reloj, 1.
- * 26. » Antonio Gil Muñoz, Profesor; Avenida Canalejas, 52, pral.
- * 27. » Benito Sanchez de Ibargüen Corbacho, Inženiero; Gran Capitan, 24.
- * 28. » Antonio del Pozo Yusta, Viukomercisto; Reioj, 1.
- * 29. » Francisco Azorin Izquierdo, Arhitekto; Claudio Marcelo, 18.
- * 30. » Rogelio Luque Diaz, Librokomercisto; Diego León, 8.
- * 31. » Enrique Obregon Gonzalez, Komercisto; Ambrosio de Morales, 10.
- * 32. F-ino Ana Mejias Roman, Instruistino; San Fernando, 151. (BLINDULINO).
- * 33. S-ro. Pantaleon Marivela Sans, Elektristo; Lope de Hoces, 10.
- * 34. » Luis Marivela Sanchez, Elektristo; Lope de Hoces, 10.

- * 35. S-ro. Benito Zafra Polo, Teksajkomercisto; Maria Cristina, 19.
- * 36. » Manuel Garcia Berral, Teksajkomercisto; Srt. Librería.
- * 37. » Francisco Muela, Str. Alta de Santa Ana, 1.
- * 38. » Andrés Carpintero Muñoz, Instruisto; Menendez Pelayo, 11.
- * 39. » Joaquin Gomez Aguado, Kuracisto; San Felipe, 3.

EKSTERLANDO

- * 40. S-ro. Paul Linarès Rapet, Inĝeniero; franco, loĝanta en Córdoba, San Bartolomé, 2.
- * 41. » Joseph Berger, Instruisto; ĉeĥoslovakiano, nune en Córdoba, Claudio Marcelo, 18.
- * 42. S-ino. Adeline Adan; 4, Korte Meir. GAND (Belgio).
- * 43. S-ro. Fikrle Frantisek, Fervoja Inspektoro; BRATISLAVA (Ĉekoslovakio).
- * 44. » Leohmere Oerter, Inĝeniero; LONDONO (Britlando).

JAEN

- 45. S-ro. Juan Anguita Galan, Librokomercisto; San Francisco, 27.
- 46. » Juan Lamonedá, Ĵurnalisto; Martínez Molina, 66.

JEREZ DE LA FRONTERA (CADIZ)

- 47. S-ro. Pedro Naranjo Teran, Industriisto; Zaragoza, 13.

LA LÍNEA (CADIZ)

- * 48. S-ro. Benito Anguiano Escolar, Nacia Instruisto. Isabel la Katólica, 60.

MADRID

- 49. S-ro. Benigno de Luna Gomez, Ŝtata Advokato; Pirineos, 7.
- 50. F-ino. Gloria de Luna Corral; Pirineos, 7.
- 51. » Josefina de Luna Corral; Pirineos, 7.
- 52. S-ro. José Perogordo Camacho, Kolonela Laŭtenanto; Los Santos, 2.

53. S-ro. Casiano Ruiz Ibarra, Naturista Kuracisto; Fuen-
carral, 138, 2.^o
54. » Vicente Alonso Sanz, Kolonela Laŭtenanto; San-
chez Bustillo, 3.
55. S-ino. Josefa Bascones de Alonso; Sanchez Bustillo, 3.
- * 56. S-ro. Julio Mangada Rosenörn, Infanteria Komandanto;
Glorieta de Bilbao, 5.

MÁLAGA

57. S-ro. Roberto Maraury, Doganisto kaj Advokato; Gra-
nada, 94.

MONTORO (CÓRDOBA)

58. S-ro. Juan Canales Garcia, Orgenisto; Santos Isasa, 21
(BLINDULO).

ORENSE

59. S-ro. Hipólito L. Luengo, Instruisto; Reina Victoria, 31.

PALMA DE MALLORCA

60. S-ro. Narciso Bofill, Inĝeniero; Sindicato, 188.
61. Esperantista Klubo Palma; Mesquida, 6, entlo.

PRIEGO DE CÓRDOBA

- * 62. S-ro. Juan Luque Diaz, Leda Industriisto; San Pedro, 12.

PUEBLONUEVO DEL TERRIBLE (CÓRDOBA)

- * 63. S-ro. José Rubio Morales. Komisiisto; San Pedro. 4.
- * 64. » Amelio Perez Almodóvar, Meĥanikisto; Mirabe-
llo, 93.

SEVILLA

65. S-ro Jerónimo de Córdoba, Pastro; Escuelas Pías.
- * 66. » Carlos Martinez Fernandez, Fervojojficisto, Plaza
de Armas.
67. » Luis del Valle, Oficisto; Delegacion de Hacienda.
- * 68. » Manuel Iznardo; Plaza de Villasís, 1, pral.
69. » Ildefono Montero, Presbitero, Nuñez de Balboa,
5, 2.^o, dcha.

70. S-ro. Manuel Carmona Canela, Oficisto; Convento de Santa Clara.
71. » Miguel Moreno Castillo, Mehanikisto; Pasaje Esquivel, 9. 6.º, dcha.
- * 72. » Joaquin Escacena, Ornama pentristo; Rado, 13.
73. » Antonio Gonzalez, Oficisto; Santas Patronas, 50, 2.º, dpdo.
74. » Julian Romero Palomino, Industriiisto; Villa Estrella, Barrio Nervión.
75. » José Rodriguez Tamarit, Oficisto, Torneo, 59.
76. » Cristóbal Rodriguez Perez, Carpentista; Divina Pastora, 9.
77. » Natalio Periañez, Oficisto; Barriada de S. Jerónimo.
78. » José Llorca Rósado, Mehanikisto; Manuel Carriedo, 103, Triana.
79. » José Japon Gonzalez, Carpentista; Azafran, 25.
80. » Antonio Velazquez, Segisto; Recaredo, 13.
81. » Eduardo Moreno Caballero, Oficisto, Torneo, 58.
82. » Santiago Ortega, Barbisto, Jesus del Gran Poder, 4.
83. » Francisco Martin Roman, Carpentista; Teodosio, 89.
- * 84. » Juan del Pozo Candiles, Mehanikisto; Pureza, 110, Triana.
85. » Ramon Fernandez Rico, Selfaristo; Sol, 62,
86. » Tomás Morillas; Apotekisto; Levies, 28.
87. » Cristóbal Garcia Cruces, Mehanikisto; S. Felipe, 12.
88. » José Fernandez Ruiz, Tipografiisto; Recaredo, 13.
89. » Antonio Gamero Martin, Oficisto; Empresa de Aguas, Patio de Banderas.
90. » Fernando Navarrete, Pentristo; San Esteban, 11.
91. » José Rodriguez Zaragoza, Segisto; Castillo, 118, Triana
- * 92. F-ino. Enriqueta Escacena Bermejo; Rado, 13,
- * 93. S-ino. Asuncion Onteniente; Plaza de Villasis, 1, pral.
- * 94. S-ro. Antonio Rcdriguez Carreras, Presisto, Procuradores, 12, Triana.

TERUEL

95. S-ro. Julio Belenguer Nuez, Oficisto; San Esteban, 5, 2.º

TOCINA (SEVILLA)

- * 96. S-ro. Isidoro Diaz Maqueda, Negocisto; Soledad, 23.

UTRERA (SEVILLA)

97. S-ro Manuel Fernandez Moreno, Industriisto; Bailén, 46.

VALENCIA

98. S-ro. Andrés Piño, Advokato; Colon, 24,
99. » Manuel Caplliure, Oficisto; Tejedores, 5, 2.º
100. » Fernando Soler Valls, Telegrafisto; Central de Te-
légrafos.
101. Federacion Esperantista Levantina; Mar, 23.

VILLANUEVA DE LAS MINAS (SEVILLA)

- * 102. S-ro. Antonio Marmol Cordero, Fervojisto; Centro, 8.
* 103. » Juan Moros Ojeda, Fervojisto; San Jerónimo, 4.

ZARAGOZA

- * 104. S-ro. Manuel Maynar Barnolas, Advokato; San Juan, 4.
105. F-ino. Sara Maynar Escamilla, Legstudentino; San
Juan, 4.
106. S-ro. Emilio Gaston Ugarte, Advokato; D. Jaime I, 68.
107. » José Larruga Bernad, Presisto; Convertidos, 9.

FINANCA FAKO

ENSPEZOJ

	<u>PTOJ.</u>
Du aliĝoj (Klubo Palma kaj Levantina Federacio) po dek ptoj.	20'00
Centri aliĝoj po kvin ptoj ⁽¹⁾	515'00
Donaco de la Sevilja Esperantista Grupo.. . . .	50'00
» » » estinta Andaluzia Esperanta Federacio..	52'80
Donaco de Juan Anguita Galan, Jaen.	5'00
» » anoncantoj en la Kongreslibro.. . . .	206'13
SUMO.	<u>848'93</u>

(1) La geblinduloj aliĝis senpage.

ELSPEZOJ

	<u>PTOJ.</u>
Silka rubando por la kongresaj insignoj.	4'50
Postelspezoj.	15'70
Murafiŝoj por anonci la Kongreson.. . . .	10'75
Presajoj	58'75
Donaco por LA SUNO HISPANA.	15'00
Dek-ses fotografaĵoj por la kongresraportoj en kelkaj gazetoj.	20'75
Sep klisaĵoj por la kongreslibro kaj raporto (la aliaj apartenas al samideano F. S. O. kiu pruntedonis ilin)	52'25
Elspezoj por regali la kongresanojn.	25'00
Tri telegramoj al Parizo kaj unu al Madrido.	16'20
Tri petskriboj al Madrido.	3'00
Tri-cent ekzempleroj de la kongreslibro kun raporto..	612'03
Afranko por la ĉi-supraj ekzempleroj.	15'00
SUMO.	<u>848'93</u>

